E-8
914

B. Kandidov

# EKLEZIO KAJ OKTOBRA REVOLUCIO

El rusa lingvo trad. J. Miŝin
Lingve kontrolis N. Incertov
kaj N. Hohlov

Г.П.Б. в .. Обяз. экз.
Лнгр 1931 год
Акт № 4658

EKRELO LEIPZIG 1931

# EKLEZIO KAJ OKTOBRA REVOLUCIO

## Antaŭ la Oktobra revolucio

En la cara Rusio, la «malliberejo de popoloj», la ortodoksa eklezio estis ilo por spirita subpremado de laboruloj. Estante parto de la polic-burokrata ŝtataparato, la eklezio lerte priservis la celojn de ekspluatistoj. Ĉiujn perfortojn, ĉiujn abomenaĵojn kaj malnoblaĵojn de la regintaj klasoj en la cara Rusio la eklezio pravigis kaj sanktigis. Tiu malkleriga forto estis grandega. Pli ol ducentmiloj da blanka kaj nigra pastraro estis kalkulataj en Rusio antaŭ la revolucio. Ekstreme diversaj estis la formoj kaj metodoj de religia efiko je la amasoj. Eklezia gazetaro kaj buŝa agitado, diservoj kaj ritoj, — ĉio ĉi estis perfekte utiligata de la pastraro por la klasaj celoj de la regintoj.

Post Februara revolucio kaj transiro de la potenco al la burĝaro, la eklezio baldaŭ adaptiĝis al novaj cirkonstancoj. La plej sankta, pli ĝuste plej malnobla, reganta sinodo, kiel oni nomis ĝin, publikigis proklamon kun la alvoko subiĝi al la novaj sinjoroj. Laŭ ordono de la eklezîĉefularo estis ŝanĝita meso,

kaj anstataŭ preĝo por la cara sano la pastraro komencis legi preĝojn «por bonkredanta provizora registaro». Kiam la provizora burĝa registaro la 3—5 de julio 1917 organizis mortpafadon kontraŭ leningradaj laboristoj, la sinodo benis tiun masakron. En la kamparo la pastraro instruis kamparanojn, ke ili neniuokaze prenu la bienulan teron. La plej «maldekstra» parto de la pastroj, nomata «ligo de l'demokrata kaj progresema pastraro», agis kune kun menŝevikoj kaj social-revoluciuloj.

Tagon antaŭ la Oktobra revolucio la eklezio, kiel ordinare, elpaŝis kiel kontraŭrevolucia forto. En granda kvanto da proklamaĵoj kaj alvokoj al la armeo kaj popolo la spiritaj paŝtistoj vokis laborulojn al interpaciĝo kun bienuloj kaj kapitalistoj, al buĉado de bolŝevikoj, promesante pro plenumo de siaj konsiloj regnon ĉielan. Dum la kontraŭrevolucia elpaŝo de generalo Kornilov la kongreso de la ortodoksa eklezio decidis sendi al li sian saluton kaj ikonon. Kune kun la burĝa gazetaro la pastraro intense instigadis ĉiujn kontraŭ la bolŝevikoj, nomante ilin germanaj agentoj kaj spionoj.

## Dum la oktobraj tagoj kune kun malamikoj de laboruloj

Dum decidaj tagoj de l'Oktobro 1917 en la centro kaj en provinco la eklezio elpaŝis kontraŭ la proleta revolucio. Proklamo, eldonita de la eklezia kongreso kaj disvastigita de la pastraro, nomis la bolŝevikojn

«germanaj spionoj, perfortuloj, perfiduloj, malvirgiguloj» kaj proponis al laboruloj ĉesigi revolucian batalon.

Dum vespera kunsido de Tutrusia eklezia kongreso, okazinta en Moskvo la 31 de oktobro 1917, oni priparolis la problemon pri batalo kontraŭ la revolucio kaj oni decidis sendi deputitaron al la milit-revolucia komitato por la propono «estigi pacon». Ĉi tiu deputitaro la 2 de novembro organizis tra stratoj de Moskvo kontraŭrevolucian solen-iron kun kantado de monarkistaj preĝoj. Krom tio la kongreso sendis al la milit-revolucia komitato specialan alvokon.

Dum ĉi tiuj tagoj la pastraro ne kontentiĝis per nuraj paroloj kaj alvokoj.

En certa vico da urboj — en Moskvo, Viborgo k. a. la pastraro partoprenis pafadon per maŝinpafiloj kontraŭ ribeliĝintaj laboristoj kaj revoluciaj regimentoj. La maŝinpafiloj estis starigitaj sur sonorilturoj de kelkaj moskvaj preĝejoj.

## Klasa aspekto de kontraŭrevolucia eklezia kongreso en 1917—18 j.

Multon faris la eklezia kongreso por organizi la religian kontraŭrevolucion. Ĉi kongreso estis kunvokita la 15 de aŭgusto 1917. La malfermon de la kongreso ĉeestis Kerenskij kaj aliaj reprezentantoj de la Provizora registaro. Oficiroj kaj reprezentintoj de la burĝaro, salutante la kongreson, esprimis la certecon, ke la pastraro sukcesplene batalados kontraŭ la revolucia movado.

En siaj multaj proklamaĵoj kaj elpaŝoj la kongreso deklaris, ke ĝi reprezentas voĉon de «centmiliona» ortodoksa loĝantaro. Sed fakte la kongreso esprimis nur profitaspirajn interesojn de ekspluatistaj klasoj, kuniĝintaj ĉirkaŭ la eklezio por organizi rebaton kontraŭ la proleta revolucio.

Estas interesa klasa konsisto de tiu ĉi eklezia kongreso. Entute ĉeestis 569 delegitoj: 270 ekleziuloj kaj 299 «laikoj». Inter la ekleziuloj estis 10 mitropolitoj, 17 ĉefepiskopoj, 53 episkopoj. Precipe tie ĉi estis reprezentita eklezia estraro.

Klasa konsisto de la «laikoj» estis ankoraŭ pli karakteriza. Inter ili estis 11 princoj kaj grafoj, 10 oficiroj de cara armeo, 132 caraj oficistoj, 22 bienuloj, 41 reprezentantoj de la grand- kaj etburĝaro, 69 reprezentantoj de la burĝa intelektularo ktp. Do la tuta kongreso konsistis el reprezentantoj de ekspluatistaj klasoj. La samon montras ciferoj pri klereconivelo de la kongresanoj. Estis 369 personoj kun supera klereco kaj inter ili estis granda parto da profesoroj, 114 personoj estis meze instruitaj kaj nur 78 personoj estis kun malsupera aŭ nefinita meza klereco. Do ĉirkaŭ $^2/_3$ havis superan kleredon, $^1/_5$ havis mezan kaj $^1/_7$ havis malsuperan klerecon. Tio-ĉi atestas la diritan pri la ekspluatista konsisto de la kongreso, ĉar dum carismo supera kaj meza klereco estis atingebla nur por riĉularo.

Ne malpli atentinda estas ankaŭ la politika fizionomio de la eklezia kongreso rilate al aparteno de ties membroj al politikaj partioj. La tuta ekle-

ziulĉefaro de la kontraŭrevolucia monarĥista organizaĵo «Ligo de rusa popolo» partoprenis la kongreson. Ĉi tie estis la prezidanto de Jaroslavla filio patriarko Tiĥono, la honora prezidanto de la famekonata Poĉaev-monaĥeja filio de nigrocentuloj (kontraŭrevoluciuloj, tiel estas nomataj membroj de la «Ligo») mitropolito Antonio Ĥrapovicki, unu el plej grandaj organizantoj de la pogroma movado kieva mitropolito Vladimiro, ĉefo de «duma»-aj (cara parlamento) pastroj-reakciuloj ĉefepiskopo Ĵitomir-a kaj Volin-a Eŭlogio, famekonata pro sia impertinenta reakcieco Omsk-a episkopo Silvestro, vaste konata kontraŭrevoluciulo kaj pogromisto pastraĉo Vostokov, unu el organizintoj de eklezia Zubatov-reĝimo ĉefepiskopo Kiŝinev-a Anastasio kaj multaj aliaj.

El eminentaj agantoj de cara Rusio ĉeestis grafo Apraksin, grafo Bobrinski, A. Guĉkov, Rodzjanko, grafo Grabbe, grafo Olsufjev, eks-ĉefprokuroro de la Sinodo A. Samarin, du princoj Trubeckoj, princo Eristov kaj al ili similaj reprezentantoj de bienularo kaj kapitalistaro.

Inter la reprezentantoj de la burĝa intelektularo precipe rimarkeblaj estis direktoro de Moskva komerca instituto kaj universitato, monarkisto kaj antisemido S. Bulgakov kaj unu el organizantoj de batalo kontraŭ apartigo de la eklezio for de la ŝtato—Kuznecov.

Ĉiuj ĉi uloj dum Oktobraj tagoj ŝirmante sin per la eklezikongreso aktive gvidis kontraŭrevolucian agadon, penante per religiaj devizoj instigi amasojn por faligo de la ĵus venkinta soveta potenco.

## Apartigo de eklezio for de la ŝtato kaj kontraŭstaro de ekleziuloj

La Oktobra revolucio disbatis la ekspluatistan ŝtatan maŝinon de bienuloj kaj kapitalistoj kaj liberigis de politika, ekonomia kaj spirita sklaveco la laborulojn. Laŭ la dekreto de 23 de januaro 1918 la eklezio estis apartigita for de la ŝtato. La tuta posedaĵo de ĉiuj ekzistintaj en Rusio ekleziaj kaj religiaj societoj estis deklarita popolhavaĵo, la asignadoj de ŝtatmono en ekleziajn poŝojn ĉesis, la lernejo estis apartigita de la eklezio, kaj ĉiuj civitanoj ricevis la rajton konfesi ajnan religion aŭ tute malkonfesi. La dekreto pri la apartigo senigis la eklezion je ĝiaj ekspluatistaj privilegioj.

Al tiu momento la rusa ortodoksa eklezio montris sin kiel intime kunfandita kontraŭrevolucia organizaĵo elpaŝanta kontraŭ la soveta potenco unuecfronte. Kontraŭ publikigo de la dekreto la eklezio respondis per plifortigo de kontraŭrevolucia agado, per organizado de kontraŭrevoluciaj rondetoj kaj demonstracioj, per pogromalvokoj ktp. Pli poste, dum la tuta civilmilito, la eklezio intense batalis kontraŭ efektivigo de la dekreto pri apartigo de l'eklezio for de la ŝtato.

## Organizado de batalo kontraŭ la soveta potenco kaj agado de patriarko Tiĥon

La eklezian kontraŭrevolucion tre baldaŭ ekestris patriarko Tiĥon, estinta dum carismo grava aganto

de la monarkista nigracentula «Ligo de la rusa popolo». La kongreso elektis lin patriarko speciale por ke li gvidu batalon kontraŭ la sovetpotenco. Laŭ direktivoj de la kongreso de 1917—18 j. kaj de Tiĥon ĉe lokaj ekleziorganizaĵoj estis fonditaj apartaj «paroĥaj konsilantaroj», «frataroj», kies ĉefa tasko estis unuigo de la kontraŭrevoluciaj fortoj ĉirkaŭ la eklezio kaj preparado de ribeloj kontraŭ la laborist-kamparana ŝtato. En organizado de la interna eklezia fronto gravan rolon ludis la epistolo de Tiĥon, vokinta la loĝantaron malobei kaj malagnoski la sovetpotencon kaj subteni la blankgvardion.

En tiu epistolo, datita 19.I.18 estis jenaj linioj, turnitaj al la bolŝevikoj:

«... Rekonsciiĝu, frenezuloj, ĉesigu viajn sangverŝadojn. Ja tio, kion vi faras, estas ne nur kruela afero — ĝi vere estas afero satana, pro kiu vi estas destinitaj al fajro gehena en la vivo estonta—postmorta kaj al terura malbeno por via idaro en la vivo ĉi-tiea — surtera.

Per la potenco, donita al ni de dio, ni malpermesas al vi komunion al la hostio krista, ni anatemas vin, se vi ankoraŭ havas nomojn kristanajn kaj kvankam laŭ nasko vi apartenas al la eklezio ortodoksa.

Ni vokas vin ĉiujn, kredantajn kaj fidelajn idojn de l'eklezio, stariĝu por defendo de la malhonorigata kaj subpremata nuntempe sankta patrino nia...

Kaj se necesos suferi por la krista afero, ni vokas vin, amataj idoj de la eklezio»...

Proklamante sian malbenon al la bolŝevikoj kaj soveta potenco, Tiĥon certe sciis, ke ili estas ateistoj kaj por ili havas nenian signifon la pastraĉa malpermeso je bulko kun vino (nomata «hostio»), kiun ankoraŭ Tolstoj nomis «kvas-supo». La celo estis alia: per aŭtoritato de dio, per minaco de eksigo el la eklezio instigi la masojn kontraŭ la bolŝevikoj, kontraŭ la reprezentantoj de l'Sovetpotenco.

En aliaj ekleziaj proklamaĵoj estis dirite, ke la kontraŭrevoluciulojn en iliaj elpaŝoj kontraŭ la soveta potenco helpos ĉiuj fortoj ĉielaj: di-sabaoto, Jesuo-kristo, dipatrino, ĉiuj sanktuloj, kaj militistaroj anĝelaj.

Ĵetante tiajn devizojn en amasojn, la ekleziuloj dum siaj kunvenoj sufiĉe malkaŝeme rakontis sian programon, kies esenco estis celado al restarigo de la cara monarĥio. Tri tagojn post la publikigo de la Tiĥon-a epistolo pastro Vostokov, parolante en kunsido de la eklezikongreso en Moskvo, diris:

... Necesas renaskiĝigi en homaj mensoj la ideon de la pura centra potenco (legu «cara potenco». — B. K.), nebuligitan per la tutrusia trompo. Ni detronigis la caron kaj subigis nin al hebreoj». Tuj kiam li estis dirinta ĉi vortojn, kongresanoj ekkriis: «ĝuste, ĝuste». «La sola savo por la rusa popolo, — daŭrigis Vostokov, — estas la ortodoksa rusa saĝa caro». Ĉio-ĉi estas skribita en «La agoj de la koncilio» (67) [1]).

---

[1]) Tiel, simile al la koncilioj de antikva eklezio, estis nomitaj stenografiaj protokoloj de la eklezikongreso. *Rim de l 'trad.*

Dum tiuj jaroj en dekmiloj da preĝejoj pastraro faris kruelegan kontraŭrevolucian agitadon. En ĉiuj preĝejoj ĉiutage estis legata speciala preĝo «pri savo de la eklezio ortodoksa», en kiu temis pri la neceso ekstermi la sovetpotencon.

Ĉiu monaĥejo, ĉiu preĝejo estis por la blankuloj helpa stabo, agitfako, deponejo kaj kaŝloĝejo. En multaj preĝejoj kaj monaĥejoj estis aranĝitaj deponejoj de armilaro kaj kartoĉoj. En la Kiev-a Mikaela monaĥejo oni trovis 64 kg da dinamito, en la monaĥejo sur Solovki — 8 tricolkalibrajn kanonojn, 2 maŝinpafilojn, pli ol 600 fusilojn kaj grandan kvanton da pulvo kaj kanonkuglegoj.

## Kiel helpis la eklezio al la kontraŭrevolucio okaze de malsato en 1921 j.

Malnobla kontraŭrevolucia fizionomio de l'eklezio videbliĝis ne malpli klare okaze de la malsato en la j. 1921. Dank'al daŭra sekvetero Apudvolgio suferis pro senrikolto. Malsatis dekmilionoj da homoj. Okazis eĉ hommanĝo. Kun netolereblaj turmentoj mortis maturaĝuloj kaj infanoj.

La soveta potenco mobilizis ĉiujn fortojn por batalo kontraŭ la malsato. Tamen suferinta pro la imperialistoj en la jaroj de l'civilmilito, Soveta lando ne povis facile venki la malsaton.

La malsatantaj kamparanoj turnis sin al la soveta registaro, petante dekreti pri forpreno de oro, arĝento kaj aliaj malnecesaj por kulto valoraĵoj el pre-

ĝejoj, por aĉeti per ili panon en eksterlando. Tiu pano devus savi la malsatantajn homojn. Konforme al tio aperis dekreto pri la forpreno de preĝejaj valoraĵoj.

Sed kiun pozicion okupis la eklezio?

Oni povus citi multajn faktojn, dirantajn, ke dum la carismo la cara registaro vaste uzis preĝejajn valoraĵojn por siaj eksplutatistaj celoj. Ankoraŭ dum Petro I el granda kvanto da preĝejaj sonoriloj estis fanditaj kanonoj. En la jaroj de la raba imperialista milito, okazigita de la bienuloj kaj kapitalistoj de ĉiuj landoj por celoj de rabado, la eklezio vaste oferis siajn riĉaĵojn por organizi ekstermadon de laboruloj, por bezonoj de l'milito. En multaj monaĥejoj (ekz. en Nova Afono) la pastraro aranĝis produktadon de kanonkugloj. Ĉion ĉi la eklezio faris propravole, ĉar tia politiko tute konformis al la celoj de l'kapitalistoj kaj bienuloj.

Sed responde al la dekreto de VCIK (Tutrusia Plenum-komitato de Sovetoj) pri la forpreno de valoraĵoj patriarko Tiĥon proklamis ordonon, en kiu li rekomendis al la ekleziuloj kontraŭstari la forprenon. Pastraro plenumis tiun ordonon. Sub la preteksto de «defendo de la preĝejaj sanktaĵoj» ĉiuloke komenciĝis preparado de kontraŭsovetaj elpaŝoj. Pastroj diris, ke la valoraĵoj estos uzataj «por «galife-oj» [1]) de komisaroj», kaj vokis loĝantaron al batalo kontraŭ la reprezentantoj de la laborist-kamparana registaro. En

---

[1]) Milituniforma pantalono laŭ fasono iniciatita de markizo Galliffet, murdisto de Pariza Komuno en 1871 j. *Rim. de l'trad.*

kelkaj urboj dank'al provokado de pastroj okazis eĉ sangoverŝado, armitaj bataloj. Tiel estis en Ŝuja, Smolensk, Staraja Russa, Rostov-Don kaj en aliaj urboj.

Sammomente en Serbio, en urbo Karlovice Sremske estis kunvokita eklezikongreso el reprezentantoj de la fuĝinta eksterlanden pastraro kaj de blankulaj elmigrintoj. La kongreso ricevis benon de Tiĥon. Ĝia prezidanto estis la fama nigracentulo mitropolito Antonio (Ĥrapovicki). La karlovic-a kongreso deklaris, ke oni devas sufoki la sovetpotencon per malsato, malvarmo, ekonomidetruo kaj armita intervenco. Tie estis akceptita decido pri restarigo de potenco de Romanov-dinastio en Rusio. Samtempe la eklezio turnis sin al la burĝaj ŝtatoj petante malagnoski la sovetan registaron.

Sufoki la potencon de laboruloj, ekstermi konkirajôojn de la Oktobra revolucio, atingi tion per ĉiu kosto, —jen kian programon havis la eklezio.

## Inter la blankuloj ĉe la suda fronto

Ĉio pridirita koncernis plejparte agadon de la ekleziuloj sur la teritorio, kie estis konstituciita la soveta potenco. Sed multe pli aktive agis la ekleziularo inter la blankuloj. La plej grava fronto estis la suda, ekzistinta preskaŭ depost la unuaj tagoj de l'Oktobra revolucio kaj ĝis fino mem de la jaro 1920. Tie la eklezio kun fervoro helpis alterne al ĉiuj blankulaj

registaroj kaj al la blankulaj generaloj Kaledin, Alekseev, Kornilov, Denikin, Vrangel kaj aliaj.

Grandan kontraŭrevolucian laboron plenumis la eklezikongreso, kunvokita laŭ ordono de Denikin, en urbo Stavropol en majo 1919. Tiu kongreso elektis «provizoran superan eklezian administrantaron por la sudoriento de Rusio», al kiu estis komisiite gvidi blankulan agadon de pastroj ĉe militfronto kaj en postfronto.

En postfronto ekleziuloj agis kune kun la organoj de blankula politika elserĉado kaj venĝpuno, kun la defensivoj. Ĉion, kion sukcesis aŭdi dum konfesprenado, ili tuj sciigis al la denikinaj kaj vrangelaj ekzekutistoj. Ĉiuloke la pastraro skribis listojn de plej aktivaj agantoj de la revolucia movado kaj transdonis ilin al la defensivoj. La plej proksima kunaganto de la defensivo estis tie sebastopola episkopo Benjameno.

La pastraro partoprenis ankaŭ ekzekutojn al laboruloj. Pastroj iris en la karcerojn de arestitoj kaj penis ekscii de ili ĉiujn «kaŝajn pensojn», ĉiujn informojn. Kaj kiam arestitojn oni kondamnis ekzekuti, pastro benis mortigotojn, krucosignis la sapumitan ŝnuron kaj aliajn ilojn de ekstermo.

En vicoj de la denikina kaj vrangela armeoj estis multaj pastroj. Ilian agadon gvidis aparta institucio— «administrejo de la armea pastraro», kiun estris antaŭe ĉefpresbitero Ŝavelski, adepto de Nikolao Romanov, kaj poste en la majo 1920 estro de la armepastroj fariĝis sebastopola episkopo Benjameno. Interalie tiu

episkopo skribis sian titolon jene: «Episkopo de Sebastopolo kaj de tuta krist-amata militistaro». Tiel estis titolataj la vrangelaj bandoj. Ĉe korpusoj de la blankulaj armeoj estis la korpusaj, ĉe divizioj — la diviziaj, ĉe regimentoj — la regimentaj pastroj. Kun kruco, skurĝo kaj fusilo iris la denikinaj kaj vrangelaj pastraĉoj «konkeri Moskvon».

En la preĝejoj de la blankula postfronto pastroj faris tedeumojn pri renverso de la soveta potenco, predikis kaj vokis ekstermi la komunistojn. La pastraro samtempe faris intensegan hommalaman antisemidan agitadon. Ĉiuj rimedoj kaj formoj de la kontraŭrevolucia agado estis vaste utiligataj de la nigra pastrara armeo.

Aŭtunon de 1920 j. la vrangelaj pastroj iniciatis projekton fari religian procesion rekte al Moskvo tra batallinion. Ili deklaris, ke per la incensilo, kruco kaj forto de la ĉiela helpo estos eble plenvenki la Ruĝan armeon kaj feliĉe atingi Moskvon. La iniciatinto de ĉi plano estis neniu alia ol la pogromisto kaj monarkisto pastro Vostokov.

En tiuj tagoj li vizitadis diversajn krimeajn urbojn kaj registris ĉiujn dezirantajn partopreni tiun krucoportan procesion. La famo pri la preparata «militiro» penetris eĉ trans la batallinion. Estus interese, kio rezultus el tiu entrepreno! Penseble, ke la Ruĝan armeon oni ne tro timigus per incensilo! La ruĝarmeanoj, partoprenintaj la civilmiliton, havis sufiĉan eblon konvinkiĝi pri la kontraŭrevolucia

agado de l'pastroj kaj malamo kontraŭ tiuj blankulaj fiagentoj estis tre granda inter la rugaj militantoj.

Certe, tiu plano finfine montris sin ordinara eklezia kontraŭrevolucia ĉarlatanaĵo. «La provizora supera ekleziadministrejo por sudoriento de Rusio» konstatis ĝin neplenumebla. Fakte tuta tiu kampanio celis nur pliboniĝi la humoron de la postfronto kaj kuraĝigi blankulajn bandojn.

Proksimume en sama tempo la suprecitita vrangela administrejo publikigis epistolon, en kiu estis nomata grandega peko tio, ke la popolo ekiris la vojon de «ribelo kaj fiarbitro» kaj ekribelis «kontraŭ la laŭleĝa, de dio sankciita potenco» — la cara. En la epistolo plue estis dirite: «dio... ruinigu la forton malamikan kaj liberigu popolon vian de la malbonaj perfortuloj. Fortikigu armilojn de la krist-amata militistaro». La «forto malamika»—tiel estis nomita la ruĝa armeo, la «malbonaj perfortuloj» — la soveta registaro, kaj la «krist-amata militistaro» — la bando de orepoletuloj, la blankula armeo, fiaginta per mono de patria kaj eksterlanda burĝaro.

Al tiuj blankulaj bandoj la epistolo diris: «Kun vi estas dio nia kun sanktuloj siaj, kun vi estas la Virgulino kun la disĉiploj siaj: Antonio kaj Teodosio el Peĉersk, Sergio el Radoneĵ, prioro Serafo, mirinda sankta maljunulo el Sarov, kun siaj sanktuloj — ĉielloĝantoj».

Helpo de ĉiuj ĉi milituloj ĉielaj tamen estis malbona!

## Religia kontraŭrevolucio en Siberio

En aliaj limregionoj de la Soveta respubliko la pastraro ankaŭ plenumis rolon de helpantoj de burĝbienula kontraŭrevolucio. Kiam en 1918 j. komenciĝis la ribelo de dungitoj de l'angla-franca kapitalo— la ĉekoslovakoj, episkopo de Ufa Andreo kaj aliaj ekleziaj gvidantoj proklamis ilin «savantoj de Rusio».

La historio de Kolĉak-a kontraŭrevolucio en Siberio atestas, ke ĉiuj ekleziaj fortoj tenis flankon de malamikoj de Soveta respubliko. En aŭtuno de 1918 j. episkopo de Kazan Jakobo en siaj alvokoj al loĝantaro skribis, instigante al batalo kontraŭ la Ruĝa armeo: «Ĉiuj kapablaj porti armilojn, stariĝu en vicojn de la popola armeo». «Popola» li nomis la blankulan armeon.

Kiam en Omsk okazis ribelo, transdoninta potencon al la cara admiralo Kolĉak, proklamita poste «Supera reganto de Rusio», — la eklezio aklamis ĉi tiun diktaturon. La 29-an de januaro 1918 elpaŝinte antaŭ la tedeumo okaze de la ĵurpromeso de Kolĉak kaj anoj de lia registaro, Omska ĉefepiskopo Silvestro diris, turninte sin al Kolĉak: «En via alta reprezentanteco nia bonkreda registaro klinas siajn kapojn antaŭ dio kaj lia honora kruco». Antaŭe la eklezio nomis dioj la unuarangajn bienulojn — Romanov-ojn, kaj nun saman oficon okupis la komisiito de la internacia imperialismo kaj blankgvardianoj— Kolĉak.

En sama parolo de ĉefepiskopo Silvestro estis ankaŭ jenaj vortoj: «Suferegas sub jugo de la perfortuloj samsangaj fratoj niaj en la meza kaj okcidenta partoj de Rusio... ni kredas kaj esperas, ke el la oriento per la mano firma ilin ankaŭ liberigos dio». Sub «la mano firma de dio» estis komprenataj la kolĉakaj bandoj.

En postfronto kaj ĉe fronto klaskaraktero de la ekleziula agado estis samforma. Eklezia kongreso en Omsk anatemis agantojn de la kompartio. La pastraro en diversaj urboj organizis kolektadon de monoferoj por la blankula armeo, ĉiu preĝejo estis stabo por formado de kolĉakaj bandoj.

Ĉefata de episkopo Silvestro la siberia pastraro sin turnis al eksterlandaj ekleziaj organizoj vokante ilin helpi kontraŭ la sovetpotenco. En ilia alvoko estis dirite pri «komunigo de virinoj» en Sovet-Rusio, pri persekutado kontraŭ religio, estis disfamigataj ĉiaspecaj kalumnioj pri la Oktobra revolucio kaj situacio interne de la Sovetrespubliko.

En la punpolitiko de la kolĉaka registaro, enkondukinta kontraŭ kamparanaro la sistemon de senindulga blankteroro kaj organizinta amasajn pafmortigojn kaj torturojn, la pastraro aktive partoprenis. Ekzemplo de tia agado estas tiu de pastro en urbo Tara Vitalio Baginski, kiu organizis dum Kolĉak-regado puntaĉmenton kaj persone gvidis torturojn de la arestitoj.

En vicoj de la blankula armeo, inter soldatoj, la pastraro disdonadis proklamaĵojn, en kiuj estis

dirite ke la bolŝevikoj estas antikristoj; la soldata lernolibro de religio diris, ke obei al Kolĉak «dio mem ordonas».

Laŭ iniciato de episkopoj Silvestro de Omsk, Andreo de Ufa kaj angla generalo Nox en la kolĉak-a armeo estis formitaj «regimentoj de Jesuo», «de la sankta dipatrino» ktp, kies soldatoj estis vestitaj per speciala uniformo kun bildo de kristo, kaj la irantoj en unuaj batalvicoj surhavis eĉ la pastran ornaton. Tiujn regimentojn partoprenis ankaŭ multaj efektivaj pastroj. Organizante tiujn regimentojn, la pastraro, Kolĉak kaj reprezentantoj de la brita imperialismo konsideris religiemon de ruĝarmeanoj kaj esperis, ke ruĝarmeanoj ne pafos al objektoj de l'kulto. Tiu celado estis malvenkinta.

## Arĥangelskaj pastroj en servo de la angla imperialismo

En la jaroj de la civilmilito la Nordo de Rusio estis okupita de eksterlandaj armeoj, kaj la ĉefrolo tie apartenis al Anglio. La angla imperialismo etendis siajn avidajn manegojn al arbaroj kaj aliaj riĉaĵoj de Rusia nordo. La unua angla invada elŝipiĝo okazis jam dum printempo 1918.

Loka pastraro dum tiuj okazintaĵoj ankaŭ montris sin malamiko de la Oktobra revolucio. En la loka gazeto, «Eparkiaj Informoj» estis presataj kontraŭrevoluciaj artikoloj, la pastraro disfamigadis mensogojn pri la sovetpotenco, en siaj predikoj vokis rezisti kontraŭ organoj de la laborist-kamparana registaro.

Kiam la nordo estis okupita de la anglaj okupintoj, la pastraro proponis al la loĝantaro ameme subiĝi al la rabokupintoj. Kiam en Arĥangelsk okazis parado de la armeo honore al la angla reĝo, ĝin partoprenis ankaŭ pastroj.

Finfine la angla armeo estis devigita forlasi la nordon. Eksciinte tion, la pastraro decidis malhelpi la evakuon de la armeo. Al episkopo de Canterbury, la ĉefo de la anglikana eklezio, la ega malamiko de Sovetlando, la Arĥangelskaj pastroj sendis epistolon, petante pri restigo de la angla armeo en la nordo. Per arogantaj kalumnioj pri la sovetoj kaj per alvokoj helpi al la blankuloj estis saturita tiu epistolo.

En ĝi estis skribite, ke nun «ankoraŭ estas tro frue senigi la nordan regionon je la frateca helpo. La soveta armeo kaj la bolŝevikoj, — diris la epistolo, —ĵetos sin sur la pacan loĝantaron, kiu estis dankema al siaj liberigintoj, ili malhonorigos niajn sanktaĵojn, prirabos niajn templojn, mokegos niajn spiritajn paŝtistojn, perfortos niajn edzinojn kaj infanojn, forprenos de ni niajn loĝejojon kaj lastan havaĵon».

La spiritaj paŝtistoj en sia rampado antaŭ imperialistoj estis pretaj al ĉia mensogo kaj ĉia malnoblaĵo kontraŭ la Soveta lando.

## Kiel eklezio helpis la intervencon

Aparte atentinda estas la agado de ekleziuloj por organizado de la intervenco. Sub tiu vorto ni kompre-

nas la invadon de kapitalistaj armeoj sur teritorion de Sovetrespubliko.

Ekstermi la fajrujon kaj lumturon de la tutmonda revolucia movado, subjugi laborulojn de Sovetlando, fari ĝin sia kolonio, — jen kion celis la internaciaj rabuloj.

Gvidrolo en la intervenco apartenis al Anglio kaj Francio. Krom ili al la blankuloj helpis ankaŭ Usono, Japanio, Belgio kaj aliaj kapitalistaj ŝtatoj. Sian helpon al la blankuloj la kapitalistoj donis tute ne senpage. Komplezon por komplezo. Ili pumpis el Sovetio valorajn metalojn, nafton, lignon, krudaĵon. Ili lasis post si multajn memoraĵojn: eksploditajn pontojn, ruinigitajn urbojn, mortpafitajn laboristojn kaj kamparanojn.

La eklezio aktive akcelis organizadon de l'intervenco. La pastraro opiniis samegala, kiu forto kaj kies interveno sklavigos la laboristojn kaj kamparanojn. Ĝi servis al la internacia imperialismo same fidele kiel al rusaj blankuloj.

Ekleziaj kongresoj, grupoj de pastraro kaj apartaj ekleziuloj en jaroj de la civilmilito sin turnis multfoje al kapitalistaj ŝtatoj, al eminentaj politikuloj kaj eksterlandaj ekleziuloj, petante, vokante ilin por intervenco, por sendo de alilandaj armeoj por sufoki la rusan revolucion.

En la sudo tiajn petojn sendis ĉefepiskopo Mitrofano, mitropolito Platono, Stavropola eklezikongreso kaj aliaj. En Siberio «La provizora supera eklezi-administrejo» de la kolĉakaj pastroj ankaŭ sendadis

al eksterlandaj ŝtatoj kaj ekleziuloj similajn alvokojn. En la nordo tion faris, kiel jam estis dirite, la arĥangelskaj pastroj.

Tiuj alvokoj abundas je mensogoj kaj arogantaj kalumnioj kontraŭ la sovetpotenco: Jen, ekzemple, en alvoko de Siberiaj ekleziuloj al ĉefoj de diversaj eklezioj estis dirite, ke en Sovet-Rusio «oni malvirgigas monakinojn, komunigas virinojn, regas plena senbrideco de la pasioj, regas malsato, malvarmo, morto». Kapitalista gazetaro kun ĝojo kaptis tiujn fabelojn kaj kriegaĉis pri neceso per fajro kaj glavo detrui la sovetojn.

Multaj ekleziuloj ne kontentiĝis pri nura sendo de leteroj kaj mensogaj artikoloj al kapitalista gazetaro, sed ili mem vojaĝis eksterlanden. Tie ili sin trenadis tra akceptejoj de burĝaj partigvidantoj, rakontis diversajn malveraĵojn pri pseŭdaj «teruraĵoj bolŝevikaj» kaj petis helpon por la kontraŭrevoluciuloj. Inter tiuj gastrolantoj estis: mitropolito Platono (estinta Odesa), mitropolito Antonio (el Kiev), ĉefepiskopo Eŭlogio (eksoficiro kaj poste ĉefepiskopo Volinj-a kaj Ĵitomir-a) kaj multaj aliaj.

Laŭ informo de diplomatiaj reprezentantoj de la Kolĉaka registaro ĝuste mitropolito Platono sukcesis ricevi de la usona prezidanto Wilson la favoran por la blankuloj decidon sendi en Siberion armilojn kaj militistaron. (Platono ankaŭ nun loĝas en Ameriko kaj ĉefas nepacigeblajn malamikojn de USSR).

Kaj kiam tiuj petoj estis plenumataj, kiam taĉmentoj da trompitaj soldatoj de Anglio, Francio,

Japanio ktp. estis venantaj por sufoki la Oktobran revolucion, tiam la pastraro faris tiumfajn renkontojn kun solena sonorado, kun solenaj mesoj kaj religiaj procesioj honore al la «savantoj».

Ni prenu unu ekzemplon. Imperialista Japanio jam delonge avide akrigis dentojn kontraŭ la Ekstrem-Oriento de Rusio. En 1918 j. ĝiaj armeoj invadis Vladivostokon, kaj poste ĝis la disfalo de Kolĉak-reĝimo troviĝis en Siberio.

Kion tiutempe faris la eklezio? En siaj protokoloj, en siaj deklaroj, en siaj proklamoj la ekleziuloj aklamis la japanan imperialismon — la «aliancanon de Rusio». Ili instruis amasojn, ke la imperialista Japanio portas al ili «pacon kaj liberon».

En unu el protokoloj de ĝenerala kunveno de paroĥaj Konsilantaroj de preĝejoj en urbo Ĉita (la 30-an de aprilo 1920) ni legas pri vica alsendo de japana militistaro precize jenon: «La servantoj de la ortodoksa eklezio, ĝiaj fidelaj filoj aklamas tiun ĉi elpaŝon de Japanio, kiel direktitan al defendo kaj protekto de la vivesenco de la rusa popolo». Prezidanto de tiu kunveno estis episkopo Meletio.

## Kontraŭrevolucia rolo de pastraro de naciminoritoj

Laŭ ekzemplo de la ortodoksa pastraro katolikaj pastroj, luteranaj pastoroj, mohamedanaj mulaoj, judeaj rabenoj kaj reprezentantoj de aliaj eklezia organizaĵoj rezistis ordonojn de la sovetpotenco kaj

kelkaj el ili montris sin aktivaj helpantoj de la kontraŭrevolucio.

Precipe malutila estis agado de katolikaj pastroj. En 1920 j., kiam Sovetio suferis malfacilan batalon kontraŭ la bienula Polio, la katolika pastraro de apudfronta zono vokis loĝantaron «ekstermi la herezulojn-bolŝevikojn», faris pogroman antisemidan agitadon kaj laŭ ordonoj de siaj sinjoroj plenumis spionan servon. Utiligante la religian fanatikecon, la katolika pastraro penis malordigi postfronton kaj intense agitis kontraŭ la sovetoj eĉ en Leningrado. Nur post aresto de episkopo Ceplak kaj speciala averto de Leningrada eksterordinara komisiono por batalo kontraŭ la kontraŭrevolucio («Ĉeka») al reprezentantoj de pola katolika pastraro, ke la kontraŭsoveta propagando estos punata, finiĝis malkaŝa kontraŭrevolucia agitado de servistoj de l'polaj sinjoroj.

En 1922 okaze de la forpreno de la preĝejaj valoraĵoj la katolika pastraro denove komencis organizitan batalon kontraŭ la sovetpotenco.

La luterana eklezio estis plene solidara al la agado de Tiĥon kaj la eklezikongreso de 1917—1918 j. Tion atestas honorletero, kiu estis prezentita al Tiĥon je nomo de ĉiuj «adeptoj de la luterana konfesio» kaj en kiu oni esperesprimis, ke baldaŭ fortoj de la kontraŭrevolucio atingos siajn celojn.

La islamana pastraro en jaroj de l'civilmilito ardigadis ĉe la malklera islamana amaso malamon kontraŭ la soveta potenco. En Siberio sub protekto de Kolĉak ili vokis por organizado de «milittaĉmentoj de la ver-

da standardo de l'profeto», en la armeoj de Denikin kaj Vrangel oficis militaj mulaoj, kaj en Kaŭkazo ili vokis la montpopolojn obei princojn kaj ekstermi «la servistojn de l'ŝajtano (diablo) — bolŝevikojn».

Simile al la ortodoksa pastraro iliaj kunfratoj laŭ specialeco sin turnadis al eksterlandaj kapitalistoj petante «pri helpo». Tian alvokon sendis georgia katolikoso Ambrosio al la Genova konferenco.

Judaj rabenoj ankaŭ ne unufoje elpaŝis ĉe la kontraŭsoveta flanko. Kiam komenciĝis la forpreno de preĝejvaloraĵoj por la malsatantoj, kelkaj rabenoj per diversaj manieroj kontraŭstaris aranĝojn de la sovetpotenco. Antaŭ la tribunalo kune kun ortodoksaj kaj katolikaj pastroj, islamaj mulaoj, luteranaj pastroj aperis ankaŭ rabenoj. En Gomel estis juĝata rabeno Bariŝanski kaj en la proceso de la krimeaj ekleziuloj estis implikitaj reprezentantoj de ĉiuj suprecititaj kultoj.

Por batalo kontraŭ la soveta potenco unuiĝis pastroj de ĉiuj kaj ĉiaj religiaj eklezioj kaj tendencoj. Kiel tipo de kuna kontraŭrevolucia agado de ĉiukonfesia pastraro povas ekzempli kunveno de la paroĥaj konsilantaroj en urbo Leningrado, kiu okazis la 29-an de junio 1919, partoprenata de reprezentantoj de la ortodoksa, juda, katolika kaj aliaj eklezioj. En la kunveno oni ellaboris multajn aranĝojn por organizi rezistadon kontraŭ la ordono de la Komisario por Popolklerigo pri forigo de religikultaĵoj el la lernejoj.

Ortodoksa pastro kun rabeno, luterana pastro kun katolika pastro, ortodoksa malnovritano kun mulao

elpaŝis kune por kontraŭrevolucia batalo kontraŭ la sovetpotenco. Estis forgesitaj reciproka kontraŭinstigado, malpacemo, rivaleco kaj malamo. La eklezia «internacio», eklezia unuecfronto kontraŭmetis sin al la internacio de la laboruloj.

## Sektanaro en servo de kapitalistoj kaj bienuloj

Sektanaj estroj disvastigas multajn mensogojn, ke ili estas «defendantoj de la laboruloj» kaj eĉ preskaŭ «revoluciuloj». El ilia rilato al la Oktobra revolucio kaj ilia rolo dum la civilmilito oni povas vidi falsecon de similaj konstatoj. Sur bazo de faktoj ni povas diri, ke la rolo de sektanaro, samkiel tiu de aliaj religiaj organizaĵoj estis treege malutila por la laboruloj.

Post la Februara revolucio la sektanaj estroj en siaj kongresoj laŭte deklaris pri la agnosko de la burĝa provizora registaro kaj promesis al ĝi sian subtenon.

En la Oktobraj tagoj la sektanoj-tolstoj-anoj eldonis en Moskvo flugfolion por la ekribelintaj laboristoj, admonantan ne plu batali kontraŭ caraj junkroj.

Ni montru nur kelkajn specojn de ilia kontraŭsoveta agado.

Antaŭ ĉio oni devas memori, kian karakteron havis sektana agitado. Dum jaroj de l'civilmilito sektanoj instruis al laboruloj, ke la savo estas atingebla nur per plenumado de evangeliaj tekstoj. Ili instruis,

ke oni ne devas sin defendi per armiloj, ili konsilis ami la kapitalistojn kaj bienulojn.

Ilia predikado pri amo al la malamikoj dum civilmilito kaj atako de imperialistoj al la soveta lando estis perfidaĵo.

Dum civilmilito la sektanoj eldonis grandan kvanton da flugfolioj kaj broŝuroj kun plej malutila enhavo. En sektanaj gazetoj sisteme estis presataj artikoloj malkaŝe kontraŭrevoluciaj.

La sektanoj malamike sintenis al la Ruĝa armeo. Ili instruis, ke oni ne devas iri en vicojn de la defendantoj de la laborist-kamparana ŝtato. Ili proklamis la dizertadon afero aprobinda kaj laŭdinda. Tolstojano Ĉertkov kaj aliaj sektanaj estroj helpis al dizertintoj rifuĝi de la armeservo sub la standardo de «senrezistemo» kaj «religia mondkoncepto».

Kiam la armeo de bienula Polio venis ĝis Kiev kaj kiam sovetiaj laboruloj bezonis unuecan kaj potencan volon al batalo kaj venko, ĝuste tiam la tolstojanoj en sia gazeto «Vera Libero» alvokis ĉesigi defendon de la soveta respubliko.

Estas konataj ankaŭ okazoj, ke sektanoj partoprenis la kontraŭrevolucian movadon, kaŝis armilojn, mortigis sovetajn agantojn. Por ekzemplo ni povas indiki la proceson de la banditoj inocent-anoj-sektanoj, kies kontraŭrevolucian kaj spionan neston en Ukrainio oni nur pene sukcesis detrui.

Samtempe eksterlandaj sektanoj akcelis la intervencon. Ekzemple amerikaj sektanoj disfamigis plej monstrajn mensogojn pri vivo de Sovetlando, paro-

lis pri «komunigo de virinoj», pri tio ke la registaro konsistas el krimuloj ktp.

Tiamaniere, vokante laborulojn ami kapitalistojn kaj bienulojn la sektanaj estroj samkiel aliaj eklezituloj samtempe helpis al la kapitalistoj kaj bienuloj aranĝi atakon kontraŭ la soveta respubliko.

## Agado de eksterlandaj ekleziuloj pri organizo de kontraŭsoveta fronto

Alilandaj ekleziaj organizaĵoj akorde al la politiko de la imperialistoj, kiuj subtenis la blankulojn, monhelpis la lastajn, sendis al ili kanonojn, tankojn, kanonkuglojn, militistaron kaj kiuj partoprenis la ruinigon de Soveta lando, akorde al ĉio ĉi alilandaj ekleziaj organizaĵoj aktive partoprenis en ĉiuj aranĝoj, kiuj celis sufokon de la soveta respubliko.

Ili disvastigadis mensogajn famojn pri la stato de soveta lando, eldonadis epistolojn kaj alvokojn batali kontraŭ la soveta respubliko, verkis specialajn preĝojn pri sukcesigo de la intervenco, delegadis militpastrojn en armeojn de intervenculoj. En eksterlando ili agadis kontakte kun blankula elmigrintaro, materiale subtenis ĝin.

La angla eklezio ankoraŭ en la jaro 1918 verkis specialan preĝon pri sukcesigo de la intervenco, kies lasta parto parolis pri neceso subteni tiujn, kiuj laboras por «restarigo de leĝo kaj ordo». La protestanta eklezio agis solidare kun la angla kaj ankaŭ helpis al la britia imperialismo ruinigi sovetan landon.

La roma papo, neniom protestante kontraŭ agoj de la blankuloj kaj imperialistoj, subtenante tiujn kaj aliajn, opiniis necesa sendi en marto 1919 al Soveta Popolkomisario por Eksterlandaj Aferoj radiotelegramon, en kiu li eldiris «energian proteston» kontraŭ kvazaŭ okazanta en la soveta respubliko «persekutado kontraŭ pastraro, precipe ortodoksa». Tiun epistolon katolikaj pastroj laŭtlegis en ĉiuj katolikaj preĝejoj de Anglio, Francio, Usono, Italio ktp. kaj ĉie oratoris «pri kruelaĵoj» de la laborist-kamparana potenco.

Iom pli poste la papo publikigis la programon de agado de l'katolika eklezio, kies unua punkto parolis pri neceso «unuigi ĉiujn klasojn», kaj la dua — pri «koalicio de ĉiuj klasoj kontraŭ la bolŝevismo».

En la batalo kontraŭ la laborist-kamparana potenco ĉiuj ekleziaj organizaĵoj de la kapitalistaj landoj agis tute kontakte. Kiam en 1923 j. estis kondamnita al mortpafo pola spiono Butkiewicz, ili elpaŝis ĉiuj kune. La «proteston» faris la katolika papo, la ĉefepiskopo Canterbury-a, la protestanta pastraro kaj eĉ la ĉefrabeno de Anglio d-ro Herc.

## Religio estas malamiko por laboruloj

Tia estis la pozicio de la pastraro dum la Oktobra revolucio kaj civilmilito. La religia fronto estis fronto kontraŭrevolucia, ĝi entute estis direktita kontraŭ la soveta respubliko, kontraŭ la revolucio

kaj por defendo de privilegioj de la klasoj regintaj antaŭ la revolucio.

Ĉu oni povas diri, ke tia rolo de la religio kaj de ĝiaj servistoj en la jaroj de la grandegaj klasaj bataloj estis hazardo?

Certe ne!

Dekkvar jaroj, pasintaj post la Oktobra revolucio, sufiĉe klare montris la kontraŭrevolucian rolon de la religio kaj eklezio. Nun, kiam la proletaro de Sovetlando transiris al la socialisma ofensivo per tuta fronto kontraŭ la kapitalismaj elementoj, kiam la sovetunia proletaro jam finas konstruadon de fundamento de la socialisma ekonomio, la religio malhelpas la socialisman konstruadon, ĝi estas ilo de la kulakaro kaj burĝaro. Kaj en ekstersovetio, tie, kie regas la kapitalo, la religio estas grava baro en la disvolviĝo de la tutmonda revolucia laboristmovado. Kune kun la social-demokrataro la ekleziaj kaj sektanaj organizaĵoj servas al la burĝaro kiel ilo por ruinigo de la revolucia konscio de l'amasoj.

Per la spertoj de Oktobra revolucio en Rusio la tutmonda laborularo povas certiĝi, kiom pravis Lenin, dirinta pri la religio:

«Ĉiujn modernajn religiojn kaj ekleziojn, ĉiujn kaj ĉiajn religiajn organizaĵojn la marksismo rigardas ĉiam kiel organojn de burĝa reakcio, servantajn por defendo de la ekspluatado kaj stultigo de laborista klaso».

---

# KLASBATALAJ VERKOJ EN ESPERANTO

**133 tagoj de Sovethungario**

Historio de hungarlanda proleta revolucio. Ilustrita artikolaro de diversaj aŭtoroj. Eld. EKRELO. Prezo GM 2.—(R. 1.35)

**Programo de Komunista Internacio**

Serio „Komunista Biblioteko Eld. CK SEU. Prezo GM 1.20 (R.—60)

**Preparantoj de milito**

Akuzo kontraŭ „Industria Partio“. Eld CK SEU. Prezo GM 0.40 (R. 0 35)

**Kapitalista sklaveco kaj socialista**

**laborganizo** de K. Radek.

Eld. EKRELO. Pr. GM 0.20 (R. 0.10)

**Financa kapitalo en la papa mantelo**

**de N. Buharin.**

Eld. CK SEU. Pr. GM 0.40 (R. 0.20)